Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung
Aperas monate
Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 23-1-80

7-a jaro | JANUARO/FEBRUARO 1952 | n-ro 1/2

N o v a J a r o

Oskar Bünemann

Ĉiu ago, ĉiu diro en la nova jaro
Estu paŝo sur la vojo al la tuthomaro.
Ĉiu penso, ĉiu vorto al la samcelanto
Montru, kien nin konduku nia Esperanto.

Kaj la kora komuneco en laboro, en espero
Diru al la geamikoj sur la tuta vasta tero,
Ke neniu staras sola sub la stelsimbolo,
Ĉar ĝi kreis komunecon de la B o n a V o l o.

Bondeziroj nun flugadas tra senlima spaco:
Fine regu sur la tuta tero: B o n o, V e r o,

P a c o !

***

KOMUNIKOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

P o r l a n o v a j a r o al ĉiuj membroj de nia AEF kaj al ĉiuj niaj gesamideanoj en eksterlando ni deziras ĉ i o n b o n a n : s a n o n, p a c o n kaj f e l i ĉ o n ! Kaj prosperon en la poresperanta agado!

LA ESTRARO DE AEF.

Kun ĝojo ni povas sciigi al niaj geamikoj en en-kaj eksterlando, ke nia afergvidanto de AEF, la multmerita pioniro de la aŭstria E-movado, s-ano Raimund C e c h, je la 1-a de januaro 1952 estis eknomata oficKonsilisto. (Amtsrat). Elkoran gratulon al li! La redakcio.

40 jarojn Esperantisto. Du el niaj meritplenaj samideanoj, prof. Rudolf K a f t a n, direktoro de la Viena urba horiogmuzeo, kaj kort.kons. Hugo S t e i n e r, fondinto-direktoro de la Internacia E-Muzeo, lastatempe festis sian 40jaran esperantistecon. La aŭstria E-istaro esprimas al ambaŭ niaj E-nestoroj sian dankon pro ilia agado por nia afero, esperante, ke ili ankoraŭ longan tempon akcelos niajn laborojn. Al s-ano kort. kons. Steiner, kiu antaŭ kelka tempo trafik-akcidentis, ni deziras baldaŭan plenan resanigon!

Unua ZAMENHOF-MONUMENTO de Aŭstrio en Wörgl, Tirolo. AEF-landestro de Tirolo Hans S t e i n e r en kunlaboro kun pluraj fervoraj s-anoj iniciatis la starigon de Zamenhof-monumento sur la stacidoma placo de la plej nova urbo de Aŭstrio W ö r g l. La preparlaboroj bone progresas kaj jam atingis nin "provizora programo" de la inaŭguro, pri kiu ni koncize raportas: Kiel dato estas elektita la 27.7.52. Antaŭtagmeze okazos katolika Diservo kun E-prediko en urba preĝejo; dum la inaŭguro parolos kort. kons. Hugo Steiner kaj Hans Steiner, aŭstria federacia kanceliero d-ro ing. L. F i g l, kiu ankaŭ senvualigos la monumenton, komerca konsilisto Martin Pichler, urbestro de Wörgl, knabo kaj knabino, kiuj deklamos poemon honore al Zamenhof, kaj reprezentantoj de E-organizoj en- kaj eksterlandaj. Sekvos festparolado, E-himno, fotografado de la solenanoj, komuna tagmanĝo. Posttagmeze

estos la jarkunveno de la E-landestraro kaj novelekto, prezentado de starfilmbildoj "25 jaroj IEMW", aŭtobusa ekskurso ĉirkaŭ la Kaiser-montaron kun mallonga halto en Kufstein kaj vizito de la mondfama Helden-orgeno sur la fortikaĵo Kufstein Vespere: adiaŭa kunveno (eventuale festvespero) Laŭcirkonstance oni aranĝos kamaradecan vesperon sbate (26. 7) kaj specialan ekskurson surmontan lunde (28 7) Ekde 26.7. funkcios stacidoma servo.

Mendojn por noktrestejoj kaj anoncojn por la ekskursoj direktu al la komitato kiel eble plej frue (limdato por ĉambromendo: 15 6 1952).

Kiel detalojn pri monumento oni ekscias, ke ĝi el busto el Carrara-mamoro kaj soklo el tirola granito konsistos La tuto staros enmeze de florparko La skulptan laboron ni dankos al s-ano Theodor O h n e s o r g e skulptisto, kiu disponigos sian arton tute senpage.

Tre fervore subtenas la starigon de la monumento la urbestro de W örgl, Kommerzialrat Martin P i c h l e r, kiu mem verkis artikolon pri ĝi por la gazeto "Sonntagspost" El multaj lokoj de Aŭstrio jam alvenis dank- kaj gratulleteroj por li kaj la urba konsilantaro. La komitato petas ke el Aŭstrio kaj eksterlando oni bonvolu tuj imiti la agon de la jamskribintoj por dokumenti al la oficialaj instancoj la intereson de la Esperantistaro.

"ILO", el kiu ni ĉerpas la informojn, prezentas la MONUMENT-KOMITATON: HONORA PROTEKTANTO: Aŭstria Federacia Kanceliero d-ro dipl-ing. Leopold F i g l ; HONORA KOMITATO: Kardinalo d-ro Th. Innitzer, ĉefepiskopo de Vieno, ministro e s. d-ro H. Frenzel, vicprezidanto de Plejsupera Finackontrolo, prez. de AEF, ĉefepiskopo de Salzburg, d-ro A. Rohracher, ekonomia konsilanto A Graus, landestro de Tirolo, d-ro P. Schwarz, sekur-direktoro de Burgenland, sekcia ĉefo d-ro E. Chalupka, sekcia ĉefo d-ro K. Dworschak, ĝenerala direktoro de la poŝta kaj telegrafa administrado Aldona informo sciigas, ke bonvolis akcepti la anecon al la honorkomitato ankaŭ d-ro E. Privat, svisa universitata profesoro.

La LOKA MONUMENT-KOMITATO konsistas el: Honora prezidanto: kort.kons. Hugo Steiner; 1. prez.: Hans Steiner, 2a prez. kom. kons. M. Pichler, urbestro de Wörgl; memb=

roj: F. Neudeck, vicurbestro de Wörgl, d-ro P. Weitlaner, prez. de la kulturestraro de W., dipl.ing. F.Mayr, arkitekto, A. Daniel, ŝtonĉizista majstro, Therese Kainer, urba oficistino, K. Höfle, komunuma oficisto.

Al la plivastigita L.M.K. apartenas: Th. Ohnesorge, skulptisto, J. Erlacher, instruisto kaj grupestro, d-ro A. Huber, E-klubestro, H. Visneider, vicklubestro, W Lagger, kriminalpolica inspektoro.

La komitato adresas peton al la E-poetoj. Ili bv. verki poemojn (ne tro longajn), kiuj taŭgu por la inaŭgura soleno. La tri plej belaj estas premiotaj (limdato por la alsendo: 31.3.1952).

Kaj nun volu aŭskulti (kaj laŭagi) la voĉon de la komitata prezidanto Hans Steiner: "Mian entaŭan planon, la Zamenhof-monumenton starigi per ne tro grandaj kostoj kaj tial ne ĝeni miajn amikojn per petoj pri monaonacoj, mi devis ŝangi bedaŭrinde, konsiderante, ke la digno de la Majstro kaj la al ni disponigita, belega placo postulas, ke ni risku la elspezojn, kiujn kostas monumento el granito. La jam kolektita monsumo ne sufiĉas kaj tial mi petas ĉiun unuopan s-anon en Aŭstrio kaj en eksterlando, kontribui sian parton al la monumento, sendante almenaŭ 1 respondkuponon aŭ aŭstr. sil. 2.50 per poŝtmarkoj). Kiu volas subteni la aferon pli grandstile, tiu bonvolu kolekti ĉe parencoj kaj gekonatoj.

Sendintoj de almenaŭ 4 resp. kup. aŭ aŭstr. S 10.-- ricevos okaze de la inaŭguro fotobildon de la monumento, stampitan per speciala poŝtstampo.

Respondkuponojn kaj poŝtmarkojn bv. sendi al Hans Steiner, Augasse 42, Wörgl, Tirolo; monaonacojn prefere al Postsparkassa-Konto Nr. 194 436 de Hans Steiner, Wörgl, Tirol."

La estraro de AEF esprimas al s-ro Hans Steiner kaj lia kunlaborantaro la dankon nome de la aŭstria E-istaro kaj deziras al ili por la projekto la meritatan sukceson.

K o n g r e s a V a l s o . La konata komponisto Viena P e t e r S c h w a r z komponis honore al la Aŭstria E-kongreso 1951 ĉarman, melodian valson. Tiu ĉi muzikaĵo, sub la gvido de la komponisto dum la kongreso ludita orkestro, pro sia melodieco estis forte aplaŭdata. Ĵus aperis kvarpaĝa eldono por fortepiano (iomete simpl-

igita kaj mallongigita, kompare al la originalo), kiu estu akirata ĉe s-ano Hans Steiner, Augasse 42, Wörgl, Tirolo. Ekspedo presaĵe S 5.70, letere S 7.50; eksterlandanoj bv. sendi 4 respondkuponojn Ĝi estas ankaŭ mendebla ĉe la E-Centro La mono ricevita, kiu superos la preskostojn, estos uzata por la ZAMENHOF-MONUMENTO!

H e l p u la eldonon de E-prospekto pri Groszglockner-altaĵpa soseo! Vi subtenos eminente la preskaŭ jam sukcesintajn klopodojn de s-ano F ö t i n g e r , AEF-landestro de Salzburg, petante skribe pri E-prospekto por la Groszglockner-regiono ĉe: Groszglockner-Hochalpenstraszen-A-G., Rainerstr. 2, Salzburg, Aŭstrio. Skribu amase!

AEF eldonis ESPERANTO-VARBILON! La efika kaj aktuala propagandilo aperis en decembro 1951 en kvanto de dek mil ekzempleroj. Pro la aktualaco (ĝi enhavas kalendaron) plej baldaŭa mendo urĝas. Kiu ankoraŭ ne sendigis ĝin al si, bv. tion fari tuj! Preskosto-kontribuo: po ekzemplero S -.10. Mendante pli grandajn kvantojn, vi ebligos la baldaŭan eldonon de nova propagandilo.

La kasraportoj de la E-Centro sciigas, ke la luprezo de la ejoj en Neutorgasse altiĝis malgraŭ la rezigno pri la butika ejo je S 300.- La kostoj de la Aŭstria E-Revuo atingis la prezon de S 800.- po eldono.

Aŭstriaj reprezentantoj de internaciaj E-organizoj: Internacia Asocio de E-istaj Instruistoj: Leopold Gschanes, Vieno 15., Pelzg. 17/II; Internacia Fervojista E-Federacio: Josef Zink, Vieno 10., Ecconomog. 33; Internacia Ligo de E-Poŝtistoj, Telegrafistoj kaj Telefonistoj: Johann Janecka, Vieno 19., Dieng. 3; Naturamika E-Sekcio: Max Finkenzeller Vieno 12., Grünbergg. 3; Internacia Polica E-Asocio: Wilhelm Lagger, Innsbruck, Pradler Saagen 17/II, Tirolo. (Vidu ankaŭ AER 10-12/1951).

La ŝtataj E-ekzamenoj en Vieno laŭ informo de s-ano ministeria konsilisto d-ro M Führing okazos dum majo. Interesitoj bv. kiel eble plej baldaŭ anonci sin en la Centro, kie ili plej frue povos ekscii la daton kaj la detalojn.

Viena Internacia Printempa Foiro 1952 okazos je la tagoj de la 9a ĝis 13a de marto. Ges-anoj el la ligilandoj, kiuj vizitos la foiron, bv. pri sia veno informi la E-Centron, kiu klopodos aranĝi specialan kunvenon.

"LA SPEGULO", bulteno de la supraaŭstria E-istaro, redaktata de nia fervora s-ano Karl N i g l , AEF-landestro, aperis en decembro pj. Ĝi informas pri aktualaj sciindaĵoj, koncernantaj la E-movadon de la liglando. La AEF-estraro dankas al s-ano Nigl pro lia nova iniciatajo kaj deziras, ke ĝi iĝu valora kaj grava kontaktilo por la supraaŭstria samideanaro.

Kiu ne memoras la vere solidaran helpon de la nederlandaj Esperantistoj al aŭstria samideanaro post la pasinta milito? Vi nun havas la ŝancon, danki al ili! La amikoj de la Zaandama E-Societo "ANTAUEN" turnis sin al ni kun la sciigo, ke okaze de sia 40jara jubileo ili intencas aranĝi internacian renkonton kun praktikaj celoj. Ili petas nin, serioze esplori, ĉu ni povos gastigi Zaanlandan E-ist(in)on en la nunjaraj somermonatoj dum kelke da tagoj. Precipe por siaj pli ol mil lernantoj ili esperas, ke ni povos ion fari. Kompetenta komitato zorgos, ke la gastoj bone regos E. La interŝanĝo okazos reciproke. Do, karaj gekolegoj, bv do tuj pripensi la aferon kaj senhezite skribi al la Centro pri via preteco, aksepti gastojn! (La alvoko estas subskribita de reprezentantoj de LA ESTONTO ESTAS NIA, SAT, UNIVERSALA LIGO, NEDERLANDA KATOLIKO, UEA kaj ASOCIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ).

1952: du vojaĝojn al eksterlando preparas la ESPERANTO-TURISMA SERVO (s-ano AEF-landestro Karl Nigl, Linz/Donau, Prinz Eugenstr. 11). Unu al Düsseldorf (SAT-Kongreso): Linz-Augsburg-Schifferstadt ĉe Speyer (2taga restado)-Düsseldorf. Returnvojago: Düsseldorf-Heidelberg-München-Linz. Por ĝi jam anoncis sin 19 personoj; estas ankoraŭ je dispono 21 lokoj, do rapide anoncu vin!

La dua vojaĝo gvidos al Jugoslavio: Linz- Salzburg-Villach-Tarvis-Udine-Görz-Trieste-Fiume-Split-Susak-Marburg; Marburg-Graz-Bruck-Hieflau-Enns-Linz. Ambaŭ veturoj daŭros 11 tagojn kaj kostos inkluzive aŭtobusoj, vizoj kaj luprezo por la tendoj S500.-- La mangajojn ĉiu mem prizorgu. La limdato por la anoncoj estas la 1. de marto. La anoncoj nur validas, se ĝis 15.3.52 estos enpagitaj al menaŭ S 50.-. Gvidonto de ambaŭ vojaĝoj estas s-ano Nigl mem. --- VOJAĜON AL LA UEA-KONGRESO EN OSLO s-ano Nigl volonte aranĝos, se anoncos sin sufiĉe da partoprenemuloj.

Nederlando - grava informo! Surpriza, sed ĝojiga informo estas, ke 60-70 E-istoj, laborantaj en la Philipps-fabrikoj de Eindhoven, Nederlando, intencas en la venanta somero viziti nian landon. TUTKORAN BONVENON AL ILI EN AUSTRIO! la s-anoj vizitos la Vienan Philipps-fabrikon por kontakti kun siaj kolegoj. La VIENA E-DELEGITARO rilatos kun la fabriko kaj klopodos aranĝi indan akcepton por la nederlandaj amikoj. La VOJAĜKLUBO preparos akcepton en Linz.

"Ĉu inter la E-istaro fakte regas solidareco, frateco kaj helpemo?" demadas s-ano AEF-landestro K. Nigl en sia "SPEGULO" kaj li konkludas: "Se jes, ankaŭ ni aranĝu kolekton por niaj italaj gekamaradoj, kiujn trafis la Po-inundo! Ĉiuj E-grupoj, kiuj povas helpi, bonvolu sendi la donacojn al la Landa Organizo de Supra Aŭstrio, K. Nigl, Linz/Donau, Prinz Eugenstr. 11, kiu rekte ekspedos ilin al la sortotrafitaj gekamaradoj!" Ni forte subtenu la helpkampanjon de s-ano Nigl kaj montru efekte, ke la Esperanto-afero estas pli ol amatorajo!

CENTRO DE ESPLOROJ KAJ DOKUMENTADO DE UEA. La 1-an de januaro 1952 ekfunkciis en Londono grava institucio de nia movado: la Centro de esploroj kaj dokumentado de UEA. La celo de la Centro estas triobla: sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado. Pere de siaj kunlaborantoj la Centro esplorados kaj studos la Internacian Lingvon kaj ĝiajn multflankajn aplikojn sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco el vidpunktoj lingvistika, sociologia kaj psikologia. Apartan atenton ĝi dediĉos al la studado de la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Ĝi ankaŭ esplorados la eblecojn por plua utiligo de E. sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco ktp. La rezultoj por tiu scienca-esplora kaj dokumentada laboro estos vaste utiligataj per verkado de artikoloj, kunmetado de prelegoj por diversaj okazoj, pretigado de skizoj por flugfolioj, alvokoj, broŝuroj, liverado de taŭga kaj dokumentita materialo por defendi la aferon de la Internacia Lingvo en kongresoj, konferencoj kaj en aliaj medioj, kiuj pritraktas la demandon de la komuna lingvo. La C.E.D. intersangados dokumentojn kun UN, UNESKO kaj aliaj gravaj internaciaj organizoj. La

direktadon plenumas honorofice prof. d-ro Ivo Lapenna, 300 West End Lane, London N.W.6, Anglio.

O S L O V O K A S V I N ! La nunjara, 37a, UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazos en Oslo, Norvegio, de 2.-9.8. en la universitato de la urbo. La cefaj programpunktoj estas: Interkona Vespero, Solena Malfermo, Diservoj, Internacia Somera Universitato, Kunsidoj de la Kvar Sekcioj, Ĝenerala Kunsido, fakkunsidoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, Kongresa Balo, Tuttagaj Ekskursoj, Oficiala Fotografigo, Arta aŭ/kaj Varietea Vespero(j), Belartaj Konkursoj, Ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Oslo, Solena Fermo k.s. - Kongresadreso: Boks 942, Oslo, Norvegio; pro kotizo, vizo, pagmaniero, aliĝilo ktp turnu vin al la ĉefdelegito de UEA, s-ano magistro F. Höfert, Vieno XIV., Penzingerstr. 102!

Laŭ statistiko de la LKK ĝis fino de 1951 aliĝis al la kongreso 406 personoj el 22 landoj, inter ili 7 el nia lando.

La A r ĝ e n t a SAT-KONGRESO (35a), kiu havos lokon en Düsseldorf (Germanio) de 2.-8.8. 1952, distribuis siajn aliĝilojn. SAT-ano pagas ĝis 30.4. gmk. 8.-, ne-ano 10.-. Adreso de la Organiza Komitato Werner van Beesten, Kolpingstr. 20., Düsseldorf-Benrath

La Akademio de Esperanto oficiale komunikis la estraron: Prez. - Ir. J.R.G. Isbrucker, Nederlando; vicprez. - A. Ĉseh, Nederlando, prof. d-ro E. Privat, Svisio; direktoro de la Sekcio por Gramatiko: d-ro W. Lippmann, Usono; direktoro de la Sekcio por la Literaturo: G. Avril, Francio; direktoro de la Sekcio por la Ĝenerala Vortaro: prof. G. Waringhien, Francio; direktoro de la Sekcio por la Teknikaj Vortaroj: J. Okamoto, Japanio; direktoro de la Sekcio por la Bibliografio: d-ro P. Neergaard, Danio. Adreso de la Akademio de Esperanto: Oostuinlaan 32, Hago, Nederlando.

L A J A R K U N V E N O D E A E F laŭ decido en la estrar-kunsido de 1.-16.1.52 okazos e n V i e n o, ĉar ne alvenis konvena invito. Provizore estis fiksataj la 7a kaj 8a de junio kiel datoj. Intencataj estas por la 7a Amika Vespero kaj por la 8a la Ĝeneral-kunveno.

La Aŭstria Esperanto-Centro dum printempo ŝanĝos sian domicilon kaj eklogos supozeble en marto en la pro-

ksimeco de Westbahnhof (Okcidenta Stacidomo), t.e. en la XVa distrikto, Fünfhausgasse 16. La Centro disponos tie pri du ejoj en butiko de novkonstruita loĝdomo de la urbo Vieno kaj pagos malpli altan luprezon.

Ĉiun merkredon la a k t i v i s t o j de la Viena E-movado rendevuas inter la 17a kaj 19a en la Esperanto Centro!

NEKROLOGO. La sorto forprenis el niaj vicoj en la lasta tempo plurajn samideanojn. Al iliaj familioj ni esprimas nian profunde sentatan kondolencon. Al la mortintoj ni konservas ĉiaman dankan memoron:

Karl W a n n e k , multjara, fervora pioniro de E. en Linz, moftis la 12an de oktobro paisntjare.

D-ro Leo B l a a s , lektoro de E. en la universitato de Innsbruck, direktoro de la ŝtata E-eksamenkomisiono kaj fidela Zamenhofano, mortis la 29an de novembro 1951.

Alois G r a b n e r mortis la 26.10.51. La grupo "Verda Stelo" kaj la Tramista Fakgrupo de AEF perdis en lia persono fervoran propagandiston kaj akcelinton.

La 15.11.p.j., eksestrarano de "Danubio", Vieno, s-ano Franz W i p p l i n g e r, ofickonsilisto e.p. elmondiĝis.

Reprezentantoj de la granda Esperantista Familio akompanis ilin sur la lasta tera vojo.

LA ESTRARO DE AEF.

A U S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

VIENO: 280 personojn kunigis la 15an de decembro la festsalonoj de la Poŝta Ĝeneraldirekcio por festi la datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof, ĉifoje komune kun la soleno de la 40jara jubileo de la Viena E-Societo "DANUBIO". S-ano honorprezidanto de AEF sekcia ĉefo d-ro D w o r s c h a k , ĝeneraldirektoro de la Aŭstria Poŝtadministracio, kiel gastiganto bonvenigis la kunvenintojn kaj, de ĉiuj danke aklamote, sciigis, ke komence de 1952 la aŭstria poŝto eldonos bildpoŝtkartojn kun tekstoj en germana k a j E s p e r a n t a lingvoj. Nia s-ano urbestro de Vieno Franz J o n a s , kiu honoris la Esp-

erantistan aranĝon per sia veno, alparolis nin - kompreneble en Esperanto - kaj esprimis sian ĝojon, ke unuafoje en sia funkcio li povas ĉeesti solenaĵon de la Esperantistoj. Inter alio li precipe atentigis pri la neceseco, ĉiel klopodi altiri junajn homojn al nia movado kaj daŭrigi per pliintensigitaj fortoj la laboron por la Internacia Lingvo, kies bezonateco kaj taŭgeco por ĉiuj medioj estas plene pruvitaj. Poste ni ĝuis la belmelodiajn "Esperanto-marŝon" kaj "Kongresan Valson", komponitajn de d-ro Peter S c h w a r z por la Innsbrucka AEF-kongreso kaj ĉi-vespere persone prezentitajn de la komponisto mem. Daŭrema aplaŭdo dankis al li.

La festparoladon faris s-ano Hugo Kraus, AEF-estrarano kaj redaktoro de nia AE-Revuo. Gi estis sekvata de "Amkanto" el la sonfilmo "La sonoriloj de Sta. Mario", kiun Esperante kantante per ĉarma voĉo donacis al ni la juna s-anino Ilse T o s c a n i ; akompanis ŝin fortepiane ŝia kolegino fraŭlino M i c k.

Dum la paŭzo oni povis akiri aron da E-libroj kaj la noveldonitan varbfolion. Por la libroservo kiel por ĉiuj aferoj, havantaj la epiteton "Esperantaj" pretis sur posteno s-anino Loibel. Komencante la duan parton de la vespero, s-anoj Vokal kaj Gasperini citis du poemojn dedicitajn al la memoro de la Majstro. Nun sekvis alparolo de s-ano dir. prof. K a f t a n, kiu kiel kŭ. ondinto de la societo "Danubio" transiris al la temo de la jubileo de la E-societo "DANUBIO", la plej malnova, aktiva societo de Vieno. S-ano Kaftan ankaŭ rakontis pri sia renkonto kun la Majstro dum la Jubilea E-Kongreso en Krakovo. S-ano oficckons. Raimund C e c h multjara estro de "DANUBIO", prezentis historian raporton pri la agado de la societo, kiu en la jaroj post 1920 estis la plej aktiva forto inter la Viena gruparo. Gia biblioteko enhavas pli ol 1.400 volumojn. Nome de AEF kaj VED s-anoj mag. ĉefkons. d-ro G r i m m e kaj E. V o k a l dankis la socieron pro gia Esperanto-fidela multvalora agado. Per komuna kantado de la Esperanto-Himno la ĉeffesto de la Viena Esperantistaro estis finata.

(Laŭ raport de R. Cech.)

* * * *

El la malsamaj programeroj la festparolado de s-ano Kraus meritas apartan mencion. Ĝi estis ne nur bonege verkita laŭ enhavo, sed same modela laŭ lingva vidpunkto. Enkonduke la parolanto memorigis pri naskiĝtagoj, festataj en familia rondo. Kutime ili estas ĝojigaj okazaĵoj, nur kiam tiu familiano ne plu vivas, tiaj tagoj estas malĝojigaj. Tamen ekzistas personoj, kiuj nur laŭkorpe mortis, sed kies spirito restos por ĉiam vivanta inter la anaro de la mortinto. Inter tiuj elektitaj homoj estas nia Kara Majstro kaj ĉiuj Esperantistoj celebras kun ĝojo kaj dankemo la tagon, kiu donacis lin al la homaro.

Ni revokas al nia memoro lian imponan verkon, admirante la geniecon de lia elpensaĵo; sed ni ankoraŭ pli klinas nin antaŭ la grandeco de lia animo. Lia koro, kvankam fizike malforta, estis tiel vasta, ke en ĝi trovis lokon la tuta mondo. Tiu koro estis plenplena je amo kaj oferemo kaj tiu oferemo trapenetris la tutan vivon de la Majstro. Por pruvi tion, la oratoro rekonstruis helpe de aŭtentikaj dokumentoj antaŭ niaj okuloj la vivon de Zamenhof tiel klare kaj plastike kiel la aŭdantaro versajne neniam spertis. Ni travivis kun la junulo Zamenhof, tiam vivinta en Bialystok, la estiĝon de la ideo de universala lingvo kaj kun la matura viro ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj malhelpis ĝian evoluon. Ni suferis kun li gravajn zorgojn pri la familio, kies vivtenado estis endanĝerigata per lia daŭra okupo pri la ellaborado de lia kara verko. Ni travivis kun kortremo la momenton, en kiu li kun sanganta koro decidiĝis rezigni por kelkaj jaroj ĉian laboron, kiu koncernis ĝin, ĝis kiam li fine ĝisvivis iom pli bonajn tempojn kaj la unuajn sukcesojn, kvankam ne la finan venkon de sia ideo. Tiun ĉi efektivigi estas nia tasko. Tial la oratoro finis sian paroladon per la solena promeso, ke ni ĉiam alten tenos la ideon de nia Majstro kaj, lernante de li la veran oferemon, klopodos atingi la finan venkon de Esperanto. F.F.

SUPRA AUSTRIO: El tiu liglando venas sciigo pri tre kuraĝa projekto. La linz-aj ges-anoj okupas sin pri la ideo de E s p e r a n t o - H e j m o unue en Aŭstrio kaj poste ankaŭ en aliaj landoj kaj ili ankaŭ

en "LA SPEGULO" 5/51 jam prezentas iom detalan planon pri la maniero kiel ili imagas la efektivigon de la konstruo, pri la amplekso kaj - la ĉefafero!- pri la financa solvo de sia ideo. "Tio ĉi estas tikla demando", ... ili skribas, "sed multaj utopioj post serioza konsiderado sin montris efektivigeblaj! Se ĉiu E-isto en la mondo envicigus en la fronton de la Esperanto-laborantaro kun firma volo kaj helpemo, ankaŭ tiu ĉi projekto ne restus utopio!". Unu horsalajron ĉiu E-isto en la mondo oferu, kaj oni ankaŭ pensas pri la uzo de la t.n. "Balonpoŝto", kiu kun por tiu celo ekstre eldonota Esperantopostmarko helpu financi la projekton. - Ni petas la s-anojn pri konciza artikoleto por pli detala aperigo en AER. La Red

Decidis unuanime aligi al AEF la "VOJAĜKLUBO", kiu fondiĝis la 14.11.51. En ĝia estraro partoprenas kiel estro s-ano Karl N i g l , vicestro Josef Wiesinger, skribisto Max Hollinger, kasistino Hermine Pek kaj kiel vickasistino Cilli Hollinger. Plej grava tasko de la grupo estas, varbi j u n a j n homojn por nia afero. Kiel ĉefan celon de la grupo oni starigis la nepran efektivigadon de "Esperanto-Hejmo" en Aŭstrio. I.a kunvenintoj speciale honoris s-anon Nigl pro liaj meritoj por E., transdonante al li Honoran Diplomon kaj deklarante lin "Honora Membro" de la klubo. - La 27.11.51 komenciĝis E-kurso por komencantoj.

El la vigla agado de la grupoj ni notas Zamenhoffeston de la Fervojista Fakgrupo kaj la E-grupo "Estonto" en Linz (13.12.51), dum kiu en plenplena festsalono k-do S i g h a r t n e r parolis pri la ideala personeco de la Majstro, kiu estu ekzemplo por ni ĉiuj. - La nove fondita "Vojaĝklubo" aranĝis Kristnaskan Feston(19.12.), kiun partoprenis 78 ges-anoj kaj amikoj. La festo estis sukcese aranĝita kaj ĉiu ricevis paketan donacon aŭ de amikoj aŭ de la grupo. Ankaŭ por la grupkaso ĝi estis kontentiga. - La grupo atentigas pri Karnavala Aranĝo, okazonta la 26.2.52 en Gasthaus Seisel. -La E-Vojaĝklubo aranĝos la 6.5.52 l e t e r v e s p e r o n . Ĝi petas, ke oni alsendu por ĝia ekspozicia fenestro leterojn, kartojn filatele afrankitajn, gazetojn, prospektojn ktp. Ĝi reciprokos la sendaĵojn per samvalorajoj: Max Hollinger, **Linz/Donau, Gruberstrato 65, Aŭstrio.**

Esperanto en Knittelfeld, Stirio. S-ano d-ro Adolf H a l b e d l , AEF-landestro por Stirio, registras bel=an sukceson de sia aktivado: Li atingis, ke en la ĉef=lernejo kaj en la metia lernejo de Knittelfeld nun okaz=as en 4 klasoj E-kursoj, kiujn li mem gvidas. La nombro de liaj novaj lernantoj estas 93! Li vere meritas nian koran gratulon kaj dankon!

Esperanto-dejorinsigno ĉe la Aŭstria Poŝto. S-ano Johann J a n e c k a , estro de la AEF-fakgrupo por la dejoristoj ĉe la Aŭstria Poŝto kaj Telegrafo, konforme al la dejorinstrukcio de la Federacia Ministerio por Trafiko kaj Ŝtatigitaj Uzinoj, Ĝeneraldirekcio por Poŝta kaj Telegrafa Administracio, BMZL. 48466-4 de la 5.11.51 kiel u n u a o f i c i s t o estis ĝustigita, porti sur sia uniformo la dejor-insigonon "Esperanto". Al sam ideano Janecka, kiu, submetinte sin en la jaron 1946 al la ŝtata E-ekzameno, plenumis la premison por la nova insigno, ni kore gratulas kaj ni volas esperi, ke lia bela ekzemplo instigos multajn E-istajn gekolegojn,rajt=igi sin por la portado de la dejorinsigno,kiu certe est=as bonega propagandilo por la internacia Lingvo.

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

AKLE-VIENO: leteradreso W. Mudrak, Vieno 3.,Beatrixg.19, kunvenas 1., Graben 13/II/25(Kreuzbundheim) ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato (17-19 h). Kurso elementa marde (19-20.30 h). - "ESPERO KATOLIKA", la oficiala organo de la internacia katolika E-movado, neplialtigis la abono=prezon. Abonu kaj pagu ĝin (S 30) al Postsparkassa-Kon=to 105713 (Walter Mudrak, Wien). --- TUTAUSTRIA KATOLIKA KONGRESO (Gesamtösterreichischer Katholikentag)okazos en Vieno de 12.-14.9.52.Ankaŭ ni kat. E-istoj, kiuj festas tiujare la 40jaran jubileon de la katolika E-movado en nia lando, intencas aranĝi: Solenan Diservon kaj Fest=kunvenon, eventuale ankaŭ laborkunsidon. Nia ĉefepiskopa moŝto kardinalo d-ro Innitzer varme favoras nian tiucel=an klopodon. Liglandaj ges-anoj, volantaj veni al Katho=likentag, plej baldaŭ anoncu sin ĉe supra adreso (aldonu afrankon). Detaloj sekvos. Ankaŭ eksterlandaj ĝes-anoj

estas kore invitataj! -- P. G.M. Roschini, prezidanto de la universitato "Marianum" en Romo, famkonata teologo, parolis detale kaj emfaze por la solvo de la internacia lingva problemo per E. dum la Unua Mondkongreso por la Apostolado de la Laikuloj, okazinta en Romo pasintan oktobron. -- "L'Osservatore Romano", la oficiala gazeto de la Vatikano de 1'23.9.51 enhavis ampleksan artikolon "Il Papa Pio X e l'Esperanto", verkitan de P. Roschini. --- AKLE-VIENO aranĝis: Diservon (16.12.) kun adventprediko de P. komandoro G. Plank en la kapelo de Kath. Gesellenverein, Vieno VI. En sama domo nun okazas helpe de s-ano Huber kurso elementa, gvidata de d-ro E. Görlich (marde, 20-21.30 h). Plue Adventmediton (11.12). kaj Kristnaskofesteton (27.12.) P. kom. Plank legis evangelion, litumgie kaj prelegis s-ano ofickonsil. Gasperini; per legado kaj kantado kontribuis s-inoj Kaes kaj Schreiber. --- La grupkunveno je 26.2.52 okazos sub devizo "Goju kaj estu vere gajaj!" -- Mortis niaj karaj gesamcelanoj: Luise Brantner, pli ol 20 jarojn fidela membro; Huberta Ryba, edzino de nia s-ano Ryba; Auguste Lintl, anino depost 1924; ĉiuj en Vieno, kaj d-ro Leo Blaas, Innsbruck, ĉe kies tombo ankaŭ AKLE speciale funebras. Ili ĉiuj restos en niaj preĝoj kaj memoroj. -- Katolikaj E-gazetoj: "LA ĜUSTA VOJO", monata cirkulero por katolikaj E-istoj, eldonata de Maria Schöttl, München (jarabono S 24.-); "ESPERANTA KATOLIKO", 3monata, eldonata de Katolika Asocio de Japanaj E-istoj (pojare proksimume S 12.-), ambaŭ aboneblaj ĉe Domvikar J. Kaps, Salzburg-Parsch, Gaisbergstr. 7.

Lastaj novaĵoj: Rezulte de pluraj aŭdiencoj ĉe la urbestro de Vieno, s-ano Jonas, kaj magistrataj instancoj, havitaj de niaj vicprezidantoj mag. ĉefkons. d-ro Grimme kaj ofickons. Cech, la Aŭstria E-Instituto ĵus ricevis la tekstmaterialon de bildlibro pri Vieno por la traduko en Esperanton. Jen nova signo, kiu dokumentas, ke persistema aktivado rikoltas sukceson!

La AEF-Centro klopodis pro E-insignoj. Ĉar la memkostoj estus tro altaj (S 8.- po peco), ĝi petas, ke la ekstervienaj ges-anoj demandu pro pli favoraj prezofertoj en siaj lokoj kaj informu la Centron.

A.EE. F. - j a r k u n v e n o

La estraro de AEF decidis en sia lasta estrarkunsido ĉijare aranĝi nur jarkunvenon de AEF, kiu okazos la 7an kaj 8an de junio 1952 en la sidejo de la E-grupo "Harmonio", Wien XV., Markgraf Rüdigerstrasze 4.

Sabate, la 7an de junio 1952: Fakkunsidoj;

Dimanĉe, la 8an de junio 1952: J a r k u n v e n o . Detaloj sekvos.

* * *

Listo de donacoj por la Zamenhofmonumento en Wörgl: AEF-Centro S 50, grupoj: Suno S 25, Laboro S 20, Centro S 30, Harmonio S 25, Danubio S 10, AKLE S 20; s-inoj Ilse Sinner S 10, Kaes S 2'50, Feichtinger S 10, Ziwutschka S 5, Weleminsky S 2'50; s-anoj O.Sinner S10, Cech S 5, Huber S 2'50, Schmid S 2'50, Schapans S 2'50, Mudrak S 5, Ditrich S 5, Dvorak S 5, Haschtalek S 2'50, prof. Sirk S3. Entute S 253.--.

Donacoj por la ESPERANTO-CENTRO: Grupoj Harmonio S 25, Konkordo S 20, s-ano Gasparini S 20, sennome S 70.

Donacoj por la PROPAGANDO-FONDUSO: S-ano Jeitler S 5.

Aĉeto de VARBFOLIOJ: Grupoj: Linz S 50, Suno S 50, instruistoj S 60, Centro S30, Harmonio S 25, Nia Vojo S 15, Knittelfeld S 20, Danubio S 20, Laboro S 20, AKLE S 10, Bregenz S 10, Wattens S 5, Konkordo S 5, Wörgl S S 10, Innsbruck S 10, Leopben S 5, Villach S 5. Diversaj ges-anoj S 83.

* * *

G u t e B ü c h e r bekommt man in jeder Buchhandlung. Warum sollst Du trotzdem a l l e B ü c h e r nur bei T R A M O N D O , Wien I., Neutorgasse 9, Tel: U 23180, Besorgen? Weil Du damit die Esperantobewegung förderst!!

* * *

Vbb

(Zl. 3216/47)

En la Esperanto-eldonejo
"T R A M O N D O"
Vieno I., Neutorgasse 9,

estas inter aliaj haveblaj jenaj libroj:

Handwörterbuch Esperanto-Deutsch	S	7.--
Handwörterbuch Deutsch-Esperanto (354 Seiten)	S	20.--
"Senhalte al la celo" legolibreto de A.Norbert	S	3.50
"La mondopaco kiel psikologia problemo" de Hans Thirring, trad. de Hugo Sirk	S	2.--
"Tri majstronovelo j" de Stifter, Storm, Kleist,	S	3.--
"Freude durch Esperanto", lernlibro de Steiner	S	5.--
Grundsätze des Fremdsprachenunterrichtes (AEI)	S	6.--
"Kantaro" (AEI)	S	2.--
"Brikisto", lernlibro el München	S	10.--
Leitfaden der Esperantosprache de H.Königstedt	S	4.50
Vienaj legendoj, trad. de A. Mair	S	2.50
Pri la Prepozicioj kaj la Akuzativo, de A.Mair	S	3.--
"Mortado" de prof.Nothnagel, trad.de B.Selzer	S	3.--
"Junaĝo" kaj "La kvar pagoj" de Stieger po	S	1.--
"Malgranda Kor' Jesu", trad. de M. Erard	S	1.20
"Veteranoj" I.Gomes Braga-Rio de Janairo 1937	S	8.--
Notlibro de praktika esperantisto, K.R.C. Stürmer	S	10.--
Tridek jarojn en la ora nordo, de Jan Welzl	S	10.--
Poemaro el Hungarlando, trad. F.Szilagyi	S	9.--
Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj, de A. Dombrovski	S	8.--
Multe pli da amo (Komedio) de L.E.Thomsen	S	7.--
Amo de Tooĵuuroo kaj aliaj teatraĵoj de Ŝimomura		9.--
Insulo de feliĉuloj, de Strindberg, trad. Frode	S	9.--
La gazeto "Heroldo de Esperanto" por 1952	S	50.--

Eigentümer und Herausgeber: österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan. Wien VI., Mollardgasse 85a